

Eŭropa mona konvencio, 3-a parto  
Claude Gacond, 120-a radioprelego, 1966.01.19 & 1966.01.22

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas Svisa Kurtonda Radiostacio. Prelegas Claude Gacond pri interesa propono por Eŭropa Mona Konvencio.

Dum la du pasintaj elsendoj mi rakontis al vi pri propono por Eŭropa Mona Konvencio farita de la franca Stud-rondo Lamennais.

Por tiuj, kiuj ne aŭdis tiujn ĉi du prelegojn, mi resume diras, ke tiu stud-rondo proponas la kreadon de Eŭropa Kompens-Oficejo, kiu funkcius inter la ŝtatoj kiel poŝtĉekkonta centro. La naciaj monoj devus alpariĝi al strike difinita mona metro nedevalutebla. Tiuj naciaj monoj, kiel la poŝtmarkoj, perdus sian valoron ekster sia nacia teritorio, profite al la lokaj naciaj monoj aŭ al ĉekoj skribitaj en super-naciaj spez-unuoj. Ĉar tiu propono sin direktas al Eŭropa Ekonomia Komunumo, ĝia proponita nomo estas **Europa**.

Mi donis konkretan ekzemplon pri la uzo de tiu Kompens-Oficejo kaj prezentis sufiĉe da respondoj pri la demandoj, kiujn oni povas sin fari koncerne al tiu propono, por ke oni povu kompreni ĝian seriozecon.

Tiu mona reformo havus la avantaĝon alporti lumon, kie hodiaŭ regas mallumo kaj suspektemo. Tiun lumon nur profitemuloj de la nuna malordo povas timi. La komercistoj, la turistoj, la mond-civitanoj kontraŭe vidus siajn labor-eblojn grandiĝi, tio dank'al la kreo de la internaciaj ĉekoj en spez-unuo Europa, kiuj faciligus la internaciajn rilatojn. Kaj la registaroj, dank'al la kreo de Centraj Bankoj, en kiuj devus esti spezataj ĉiuj importoj kaj eksportoj, havus multe pli efikan kontrolon super la nacia financa situacio.

Libera internacia interŝanĝo ne estas efektivebla en la hodiaŭa mondo. La proponata mona konvencio ĝin faciligus, ĉar la importantaj landoj povus ekzakte kontroli la situacion de siaj debititaj saldoj. Kiam ili vidus, ke tiuj saldoj alproksimiĝas al la buĝetita alteco, tiam ili tuj povus interveni. Hodiaŭ pro la neblo de mona kontrolo, la registaroj malfacile regas siajn importojn kaj ĝenerale povas interveni nur tro malfrue, kiam la situacio estas kriza.

La konstruo de homeca mondo dependas de multaj faktoj. Malarmado verŝajne nur postsekvas aliajn rezignojn pri perforto. Unu el tiuj rezignoj estas ĉesi voli trudi sian nacian monon kiel mondan monon, do fine rezigni pri mona imperiismo. Pro tio estas utile diskonigi la projektojn pri internacia mona reformo.

Sen internacia normigita mona sistemo, kiu protektas la financan aŭtonomecon de la aliĝintaj landoj, tiam paco verŝajne neniam povos esti konstruita. La manko de ordo kaj lumo en la nuna internacia mona sistemo estas konstanta ĝermo al suspektado kaj pordoj larĝege malfermitaj al plej diversaj ekonomiaj imperiismoj.

Kio hodiaŭ plej venenas la internacian ekonomian vivon, tio estas, ke la registaroj malfacile povas sin protekti kontraŭ alilanda investado. La plej altruistaj helpoj al subevoluintaj landoj estas ofte venenataj de suspektemaj timoj.

La Stud-rondo Lamennais donas interesajn informojn pri la alilandaj investadoj en Francio, kiuj hodiaŭ altiĝas ĝis 5 miliardoj da dolaroj (66 miliardoj da steloj).

Tiu mono ĉefe alvenas el Usono, ĉar en Francio, kiel en ĉiuj ceteraj okcident-eŭropaj landoj, la mon-profitado produktas 6 ĝis 7 procentojn, dum en Usono ĝi produktas 4 ĝis 5 procentojn. Tiuj 66 miliardoj da Steloj investitaj en Francio kaj salajrataj meze je 6 procentoj elprenas el Francio jaran tributon, kiu altiĝas je 1,5 miliardoj da francaj frankoj (44,5 miliardoj da Steloj.)

Eŭropa mona konvencio, 3-a parto  
Claude Gacond, 120-a radioprelego, 1966.01.19 & 1966.01.22

Ĉiu lando konas tiun problemon kaj provas sin protekti kontraŭ la alilanda investado. La du pasintajn jarojn la svisa parlamento devis akcepti leĝon, kiu limigas tiun alfluon de eksterlandaj kapitaloj.

En multaj financaj medioj oni sin demandas, ĉu la libera cirkulado de kapitaloj, laŭdata kaj reliefigita en la artikolo 3b de la Roma Traktato, ne prezentas fine danĝeron.

La propono por Eŭropa Mona Konvencio de la Stud-rondo Lamennais forigus tiun danĝeron, ĉar ĉiuj monaj operacioj inter la landoj de Eŭropa Ekonomia Komunumo okazus per malfermo de kredita kaj debita enskriboj. Jam pro tio tiu propono renkontos studemon en la ekonomiistaj medioj kaj en la internaciaj rondoj.

En epoko kiam la mona koloniismo aŭ eĉ nur supektemo al tiu koloniismo venenas la internaciajn rilatojn, tiam estas kuraĝige konstati, ke rimedoj kapablaj kuraci tiun situacion estas ekzistaj kaj proponataj.

Kiam neceseco pri perpoŝtaj interŝanĝoj sentiĝis, tiam la homoj inventis la poŝtmarkon. Ili nun sentas la bezonon regi siajn varajn interŝanĝojn. Povus la proponoj de la Stud-rondo Lamennais esti aŭdataj en plej diversaj medioj. Tiurilate la esperantistaro povus ludi utilan rolon. Kial tiu temo ne estus studata dum unu el niaj multnombraj kongresoj. Nia gazetaro povus malfermi siajn kolumnojn al detalega diskuto pri tiu demando kaj eĉ povus fari pliajn proponojn. La Stud-rondo pensis eŭropece. Sed la tuta mondo bezonas monan reformon.

En la epokoj, kiam homoj pretiĝas surluniĝi, ni almenaŭ komprenu, ke provi reformi la hodiaŭan monan kaoson ne estas utopiaĵo, sed urĝaĵo.

La sekretario de la Stud-rondo Lamennais promesis sendon de informilo al la interesatoj. Do skribu al nia radio por ĝin ricevi.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-